

**FLANDRA
ESPERANTISTO**

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

Oficiala Organo
de

Flandra

Ligo

Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereniging zonder Winstbejag
Magdalenestraat, 29, KORTRIJK
Poŝtĉekkonto: F. E. l. 3268.51

EL LA PREZARO:

Per balono al la poluso — André	Fr. 70,—	bind.
Leono de Flandrujo — Conscience	55,—	
Pallietier — Timmermans	43,—	
Pallietier — Timmermans	33,—	broŝ.
Streĉita Kordo — Kalocsay	23,—	»
Ĉirkaŭ la Mondon — Scherer	35,—	»
La Esperanto-Klubo — Malmgren	6,50	»
Printempo en la Aŭtuno — Baghy	14,—	»
Hurah! — Baghy	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	»
Amo kaj Poezio — van Schoor	10,—	»
La du Amatinioj — de Musset	10,—	»
La Infanoj de Betlehem — S. Lagerlöf	5,—	»
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf	12,—	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gosta Berling — Selma Lagerlöf	39,—	»
La Sorĉistino el Kastilio — S. Asch	24,—	»
Verdaj Donkiĥotoj — J. Baghy	14,—	»
Examenopgaven	6,50	»
Dialogoj en Esperanto — E. Dahl	3,75	»
Dialogoj kaj Komedietoj — E. Dahl	3,75	»
Kongreskantaro	3,—	»
Tra la Labirinto de la E. gramatiko (volmakingskursus)	36,—	»
La Konsilanto pri la E. gramatiko (taalontwerpen)	12,50	»
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,—	»
Leerboek Dirksen, 2 deelen	12,50	»
Konversacia Literaturo (10 illustr. broŝuroj)	10,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witteryck	5,—	»
Literatura Mondo (monata revuo) Jarabono	62,50	»
Groot Woordenboek Van Straaten	70,—	»
Schidlof Zakwoordenboek	22,50	»
Kantaro Esperantista — J. Karnas	6,—	»
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)	15,—	»
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n ^o 1)	10,—	»
Flageto por biciklo	6,—	»
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	1,50	»

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 1,75 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,25 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 3,50 fr.

Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Glumarkoj « Vredesaktie » po 3 fr. por 100.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.


Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

La prezoj ne entenas afrankon.

Flandra Esperantisto

Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate



Redaktoro :
Juul Karnas
Van Havere lei, 14
Deurne-Zuid (Antw.)



Administranto :
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk

Jara abonprezo : 20 frankoj.—Eksterlando : 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpage.
Poŝtĉeko : 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Nia Enketo

Kiu silentas, tiu aprobas, la proverbo diras.

Cu el tio ni rajtas konkludi ke niaj gelegantoj ĝenerale estas kontentaj kun la enhavo de nia revuo? Ĉar... nur malgranda estas la nombro da respondoj pri nia enketo, publikigita en la novembra numero.

Ni volas supozi ke do la granda plimulto el la legantaro juĝas ke la enhavo de Fl. Esp. estas kontentiga. Des pli facile estas por ni analizi la konsiderojn, konsilojn, dezirojn, petojn kaj eĉ la sopirojn de tiuj, kiuj ensendis siajn respondojn al niaj demandoj.

Tri demandojn ni faris: 1^o) Kion vi ŝatas en Fl. Esp.? 2^o) Kion vi ne ŝatas en Fl. Esp.? 3^o) Kion vi dezirus?

La respondoj al la 1a demando estas por la redakcio kontentigaj: ĉiuj ĝenerale aprobas la nunan enhavon. La plej malforta esprimo estas: « kontentiga »; la plej forta: « tre taŭga ». La plej mallonga respondo: « Cion ». La plej longa respondo ni ne povas represi nun, sed kiel vojmontrilo por la redakcio povas servi la frazo: « Vidu la lastaperintan (novembran) numeron, ĝi jam estas ege pli interesa ol la antaŭaj ».

La 2an demandon pli ol la duono de la ensendintoj ne respondis. El la aliaj respondoj ni ĉerpas: « Represojn el aliaj Esp. gazetoj, se ili ne havas gravan kaj aktualan signifon ». « Poemojn kaj kantojn sen la muziko kaj artikolojn pri politikaj aferoj ». « Preserarojn » diras la ensendintino kiu la 1an demandon respondis: « Cion ».

Estas por neprofesiaj redaktoroj, ne disponantaj pri konstantaj kunlaborantoj, tre malfacile plenigi ĉiumonate 16 paĝojn per ĉiujn kontentiga legaĵoj! Se estas tro malmulte da kopio, ni devas ĉerpi el aliaj gazetoj. Okazas, precipe dumvintre, ke ni havas tro multe da kopio... sed ne ĉio taŭgas por enpresigo! La poruloj por poemoj kaj kantoj estas tiel multnombraj kiel la kontraŭuloj. Por ambaŭ

partioj kontentigi, ni en la decembra numero aperigis neniun poeziaĵon kaj en la januara numero ni dediĉis du paĝojn al la poetoj.

Preseraroj! Brrr! Kaŭzo de grizhariĝo aŭ ŝenhariĝo por la korektisto! Kaj tamen ne eviteblaj! Ĉar pro la nuna kompostmetodo linotipa, la kompostisto devas renovigi tutan linion se nur unu eraro troviĝas en ĝi. Kaj ofte okazas, ke en la « plibonigita » linio troviĝas du novaj eraroj! La januara numero estas la dua kiu estas presita de nova presisto. Tiu ĉi sinjoro estas tre afabla por ni kaj klopodas plenumi ĉiujn niajn dezirojn. Plue liaj kondiĉoj estas multe pli modestaj ol tiuj de la antaŭa presisto.

Kion vi dezirus? Estis antaŭvideble ke tiu ĉi demando kaŭzigus aron da deziroj.

La plej menciindaj estas: Portretoj de grupoj kaj personoj. Indiko de la radio-stacioj kiuj dissendas Esp. disaŭdigojn. Flandraj kantoj esperantigitaj. Aperigo de leteroj de eksterlandaj samideanoj. Konkursoj inter la legantoj; partoprenantoj devus verki artikolon pri iu ajn temo, kiu estus ekzemenata de komisiono. Informoj pri aktualaj Esp. verkoj kaj gravaj okazaĵoj en Esperantujo. Pligrandigo de la revuo (!). La plej mallonga deziro: regula apero!

Ni klopodas respondi al supre nomitaj deziroj.

Rilate la enpresigon de portretoj de grupoj kaj personoj; tio estas ebla, se oni zorgas por kliŝoj kaj portas la kostojn por al- kaj resendo. Indiko de radio-stacioj dissendantaj Esp. disaŭdigojn estas tre alloga, sed nur sukcesplene efektivebla, se nia revuo estus semajna kiel « Heroldo », anstataŭ monata.

Pri kantoj kaj poemoj ni jam respondis analizante la respondojn al la 2a demando. Se korespondemuloj ricevas interesan leteron de eksterlanda samideano (aŭ prefere de samideanino!) sendu ĝin al ni. Pri aktualaj Esp. verkoj kaj gravaj okazaĵoj ni informas la legantaron laŭeble.

Pligrandigo de nia revuo? Kompare al tre multaj aliaj landaj kaj regionaj Esp. monataj gazetoj, nia revuo estas sufiĉe ampleksa. Pligrandigo ankaŭ signifus plialtiĝo de la kostoj, kaj tion ĝi ne povas toleri!

Regula apero... Ho! Julinjo, ni bedaŭras ke vi ne loĝas en Antwerpen. Ĉar tiam vi persone estus povinta konstati, kiom da ĝemoj kaj ŝvitgutoj, blasfemoj kaj malbenoj, telefonparoloj, tramveturoj kaj ŝuplandoj kostis al ni la plenumon de via deziro almenaŭ por la januara numero! La Redakcio *ĉiam* estas preta ĝustatempe; sed la presisto, kwankam bonvolema, ne ĉiam povas liveri kiam nia ekspedisto tion deziras.

La prej grava deziro ni konservis ĝislaste: Konkurso inter la gelegantoj. Ni petas al la eminenta deziranto, ke li ellaboru detalan ideon en artikolo, kiun ni volonte aperigos. Estas bona ideo. Tiamaniere ni malkovros dormetantajn fortojn kaj, ĉu ne estas eble ke ni tiel trovos *la* anstataŭonton por nia nedefinitiva funkcio?

LA REDAKCIO.

Tiel estas Brussel !

Vi deziras ekkoni, vi emas veni al Brussel?

Mi ne diros tion kion la popola poeto A. De Weerd en sia malnova kanto diris: « Se vi volas vojaĝi al nia Brussel,

Vi akre ĝin poste bedaŭros...

ĉar malgraŭ la « francaj fanfaronajoj, per kiuj finiĝas ĉiu strofo de tiu kanto, mi diras « Venu! Vidu! Venku! »

Por ni, Flandroj estas vojaĝo de kelkaj minutoj (nun mi ankaŭ iom fanfaronas, ĉu ne?) Ni diru do eĉ por la plej malproksimaj... de du horoj... ĉar Brussel ja estas la centro de tiu giganta aranea reto, kiun la fervojo formas en nia lando. El tiu urbo antaŭ centjaro forveturis la unua trejno sur la eŭropa kontinento. Tiu vagonaro, en kiu oni bezonis ombrelon pluvan-aŭ sunan por protekti sin kontraŭ akvo aŭ sunbrulado, majeste promenis al Mechelen. Kaj tiu lasta urbo certe ankoraŭ envias la « ĉefurbon » sekve de la fakto ke ĝi estis destinata iĝi la fervoja mezo, kiu nun Brussel estas...

BRUSSEL estas kiel multaj el siaj filinoj, surpentrita, surkolorita, surdesegnita belulino, kiu alrigardas vin per brilantaj, nigraj okuloj, kiuj fiksas sin al vi kiel tiuj de frivola Venuso.

Brussel estas pariza modopupo kiu ŝatas habili pri filmo, balo, teatro, dancistinoj, kabaredoj, ĉevalvetkuroj, sed precipe pri modo: pariza modo; pri parfumo: pariza parfumo; pri amo... pariza amo! Ŝi parolas lingvon, sed tio nur estas... pariza lingvo!!!

Ŝi (la modopupo) estas gastama ĉar vi vespere ne povas promeni laŭ la bulvaroj ne aŭdante je amdolĉa tono « chéri » (karulo)

BRUSSEL estas grandskale, kiel ĝia « malnova foiro » (kiun la popolo nomas « cimofiro ») estas malgrandskale. Ĉio kion vi deziras, estas aĉeteblaj en miloj da grandaj, mezgrandaj, malgrandaj kaj etaj butikoj, magazenoj, vendejoj...

Sed ni ankaŭ parolu iom pli serioze.

Se vi estas artisto, aŭ admiranto de belaj artoj ĉiuspecaj; se vi estas sciencisto, eĉ astronomisto aŭ koloniisto, vizitu Brussel! Vi trovos ĉi tie muzeojn de belaj artoj (antikvaj kaj modernaj), natursciencan muzeon kun bestoj, (almenaŭ bestskeletoj el prahistoriaj tempoj), ĉinan turon, folklorajn muzeojn. En la antaŭurbo UKKEL vi trovos stelobservejon kaj en la proksima TERVUEREN, kolonian muzeon.

BRUSSEL estas ankaŭ helparolanta ĉarlatano, kiu vendas rimedojn kontraŭ la granda sufero de nia tempo: la pesimismo!

Eble tiu balsamo ne estas optimismo, sed la ebleco forgesi ĉion, ankaŭ la amĉagrenojn-kordolorojn-monnizerojn...

Venu! Venu! krias la ĉarlatano... Venu kaj eniru!

Kaj vi estas sorĉita de ĝiaj vesperaj lumoj, multkoloraj, turnantaj, kurantaj, saltantaj, pli magie ol la plej bela Venezia fajraĵofesto.

Venu! Venu! kaj eniru!

Vi ja devas forgesi ĉion por ne trovi la morton sub la radoj de ĝiaj bicikloj, motorbicikloj, aŭtomobiloj, tramoj... kaj bakistveturiloj!

BRUSSEL estas la urbo de « Dio kreas la fagon kaj ni traflugas ĝin! La vera Brussel-ano nur konas la estanto, li ne priokupiĝas pri

morgaŭ, li ĝuas hodiaŭ kiel eble plej multe. Li sin sentas kiel riĉulo en sia malriĉeco.

Ke Brussel iom fanfaronu, iom blufu! Pardonu ĝin. Kiu ne estus fiera eĉ iom malhumila kun ĝia reĝa korto, ĝia senatejo, ĝia parlamentejo, ĝiaj tutspecaj administracioj, ĝia impona popolnombro!

Cu vi dubas?

Se vi nur duonhoron promenas tra la malnova urbo kun ĝiaj centoj da stratoj, « koridoroj », anguloj, kiuj vin montros ĉiuj aparte tutan suĉinfanternejon, tiam vi ne plu miros pri la pli ol duonmiliono popolnombro!

BRUSSEL fieras, rajte kaj fakte, kaj do pardonu ĝin se ĝi eĉ iĝas iom aroganta. Ĉu ĝi ne parolas al tuta la mondo per ĝia Radio-buŝo. « Tie ĉi Brussel N. I. R.! » (Hier Brussel N. I. R.)

« Hier Brussel N. I. R.! »... Kiam ni en Flandrujo aŭdas tiujn vortojn, ni ja ofte tro malfrue ĝojas, ĉar tiam ni pensas ke ankaŭ « rajte kaj fakte ». Brussel estas Flandra Urbo.

Rajte Brussel estas Flandra Urbo.

Sed fakte!

Brussel jam estas duone francigita, keĵ la alia duono ankaŭ sin kaŝas malantaŭ franca etiketo...

Kio ankoraŭ estas flandra en Brussel, la « francemuloj » nomas « Folkloron » kaj vere la antikvaj konstruaĵoj de tiu malnova brabantia urbo memoras al la flandra estinteco.

Kaj tamen kun nia fajra flandra amo, ni DEVAS veni al Brussel! Ni devas defendi la flandran animon, kiu ĉiam preskaŭ sufokita restas, malgraŭ ĉion... Ni devas veni al Brussel... kaj vidi. Ankoraŭ estas tempo, sed necesas ke ĉiuj flandroj kunigite almarŝas... Ĉiuj sen escepto de politika aŭ aliaj konceptoj.

La Bruselaj Flandraj Societoj donis la ekzemplon... Flandrujo sekvu!

Kune kun Brussel, Flandrujo vivos aŭ mortos!

Ni devas veni al Brussel, batali man' en man'.

Kaj ni venkos.

BRUSSEL reformiĝos en Flandra Belulino kiel antaŭ jarcentoj, ĝi reiĝos la fratino de la Dibenata, ĉiam flandra Antwerpen!

Pol VARENS.

TRI KONSEILOJ:

Senprokraste pagu vian kongreskotizon !

Varbu abonantojn !

Portu videble vian verdan stelon !

Leteroj el Esperantujo

IV.

AMIKO LA KOKO,

Laŭ la lastaperinta numero de « Esperanto » mi povas konstati ke ĉiuj fortoj de la U. E. A. estraro kunlaboras por forigi la grandan deficiton de la lastaj jaroj. Neniu svisa franko oni elspezas senbezone. La budĝeto por 1935 estas tiel kunmetita, ke ĝi ŝparos pli ol 20.000 sv. fr. kompare al la budĝeto de 1934! Mi ne povas repuŝi rememoron al la kongreso de 1932 en Parizo. Tiam partoprenis iu S.ro Onnen (mortinta en 1934) kiu, paginte el propra poŝo, aperigis broŝuron en kiu li denunciis la estraron pri malbona direktado kaj ankaŭ treege kritikis la elspezojn de U. E. A. Dum la ĝenerala kunveno de U. E. A. oni atakis S.ron O. de ĉiuj flankoj pro tio; oni furiozis kontraŭ li, mi eĉ aŭdis krion: Oni enterigu S.ron Onnen! Nun S.ro O. estas enterigita... sed evidentas ke almenaŭ la financa ĥaoso estis vero. Se vi traserĉas la numerojn de Fl. Esp. de tiu tempo vi certe trovos fragmentojn el tiu broŝuro.

Sed feliĉe nun U. E. A. havas aliajn estraranojn; regas alia spririto; kaj oni rekonstruas la potencan konstruaĵon, kiun la mondmovado ne povas malhavi.

Tial estas tre bedaŭrinde ke la « akso », ĉirkaŭ kiu turniĝas la tuta U. E. A. malfortiĝis. Ni ja legis en Heroldo ke S.ro Kreuz, la direktoro de U. E. A., irante hejmen de sia oficejo tre malfrue, sekve de trostreĉa laboro falis surstraten trafite de nerv-akcidento. Kiam vi legos ĉi tiun leteron, ni esperas ke S.ro Kreuz ree estas laboranta energie kiel antaŭe.

Ĉu vi iam aŭdis pri la Esperanto-Akademio?

Ĝi estas la plej ĉefa instituto de la mondmovado. Ĝiaj membroj estas elektataj de la Lingva Komitato. Vi do povas esti certa ke ĝi konsistas el la plej inteligentaj homoj el nia movado. Bedaŭrinde ili bezonas tre longan tempon por realigi ion.

Imagu: Laŭ oficiala sciigo de la Akademio No 4 de junio 1934 estas aldonita al la Universala Vortaro serion da novaj vortoj. La unua « nova » vorto estas... bulteno. Mi froŝis miajn okulojn kiam mi legis tion, ĉar tiel longe mi estas Esperantisto, tiel longe mi renkontis kaj uzis la vorton. Tiuokaze la Akademio sanktigis nur tion, kion la Esperantistaro jam de longe uzas.

Sendube vi ankaŭ legis la allogan programon de la Roma Kongres-Komitato. Ni povus nomi tiun Kongreson « la Vojoganta Kongreso » ĉar ĝi okazos en diversaj lokoj kaj eĉ sur ŝipo kaj daŭros 14 tagojn! La komitato kredeble konvinkiĝas pri la dikeco de la monujoj de la partoprenontoj. Volonte mi partoprenus... sed mi devas ripeti eldiron de iu mia prapatro: « La vinberoj estas acidaj! »

Nun ni rakontas ion novan el « apuda Esperantujo ». La Belga Ligo Esperantista demandas: « Bonfaremajn Membrojn ». Tiaj membroj devus pagi 100 fr. jare anstataŭ 30. La 70 fr. servus por venki la krizon. Se nur 50 de tiaj B. M. sin anoncas, tiam la krizo por la Belga Movado ne plu ekzistas. Ne pensu ke mi volas min intermiksi en la internaj aferoj de B. L. E.; kontraŭe, se en nia Flandra

Ligo troviĝos tiaj membroj kiam ĝi bezonos ilin, des pli bone. Sed estas io, kion mi nur malfacile povas engluti. La M. B. havas rajton je speciala mencio. Altrudas sin al mi la penso ke oni tiel ekspluatas la homan vantecon. Aliflanke povas okazi ke M. B. iom malhumile alrigardas la ne-M. B. ojn. Mi esperas ke B. L. E. havos sian kvindekon da M. B. sed ankaŭ ke ĉiu M. B. diros: Mi cedas mian rajton pri speciala mencio. Bonfaru kaj ne rigardu malantaŭen!

Por fini mi plenumos vian peton, skribante ion pri la deveno de la vorto « UIVER ». La literojn « UI » vi prononcu kiel la literojn « EU » en la germanaj vortoj « DEUTSCH » kaj « KREUZ ».

Ĉiu aviadilo estas rekonebla per serio da literoj troviĝantaj sur la flugiloj. La du unuaj literoj indikas la naciecon. Ekzemple por Nederlando: P. H.; por Belgujo: O. O. k. t. p. La sekvantaj literoj servas same kiel signalfagoj sur ŝipo: el tiuj literoj la oficistoj povas difini la nomon. La K. L. M. (Reĝa Aervetura Asocio) en Nederlando baptas ĉiun el siaj aviadiloj per birdnomo. Kaj la komenclitero de tiu birdnomo devas esti la sama, kiel la lasta litero de la serio sur la flugiloj. Ĉar la literserio de la « UIVER » finiĝas per « U », oni devis serĉi birdnomon komenciĝantan per U. Estas nur unu tia nomo: « UIL » (strigo) kaj la K. L. M. jam posedis aviadilon nomitan « UIL ».

Oni telefonis al la Haga zoologia ĝardeno sed ankaŭ tie oni ne sciis alian nomon. Poste oni prenis la vortaron de Van Dalen kaj per la fingro sekvis ĉiujn vortojn sub « U ». Fine oni trovis « UIVER ». Ĝi estas bastardvorto, kiun oni uzas ie en malantaŭa angulo de la provinco Gelderland kaj ĝi signifas « ooievaar » (cikonio). La diferenco ne estas tiel granda kiel ŝajnas. Se ekzemple iu doklaboristo en Antwerpen elparolas la vorton Uiver, ĝi sonas kiel « Oiver » kaj inter Oiver kaj Ooievaar la diferenco estas minimuma.

Bedaŭrinde la belega venko de la « UIVER » dum la veturo al Melbourne estas sekvata de abomena katastrofo. Vi scias ke ĝi pereis en la Siria dezerto. Ni klinu la kapojn pensante al la kuraĝaj pioniroj, kiuj perdis la vivon en la batalo por la venko de la Aero!

Ciam la via,

R. LA VULPO.

« Homoj » !

Sekve al demando de iu samideano, Flandra Esperanto-Instituto mendis literaturan libron en la eksterlando.

F. E. I. ricevis fakturon kun la indiko ke la libro: « venos el Amsterdam ».

Anstataŭe, la libro venis el Antverpeno kaj kun dua fakturo de Belga Esperanto-Instituto.

La libro estis makulita per verdinka adresstampo kaj la sekretario de F. E. I. resendis ĝin ĉar B. E. I. ne konsentis la kutiman rabaton.

Hektor Boffejon, « administranto-delegito » de B. E. I. juĝis tre sprita sendi leteron por diri:

*NI ESTAS KONTENTAJ KE VI RESENDIS TIUN LIBRON,
Ĉar FINE NI PREFERAS NEGOCI NUR KUN « HOMOJ ».*

Tio ne ankoraŭ sufiĉis al samideano Boffejon kaj li sendis alian leteron al la eldonejo, el kiu mi ĉerpas jenajn floretojn:

« Tiu sinjoro de FLANDRA Esperanto-Instituto tamen ne volas » aĉeti librojn de BELGA Esperanto-Instituto kaj do resendis al mi » la libron senditan al li por plenumi la suprecititan mendon. »

« Ni sendas kopion de tiu ĉi letero al Flandra — (ĉu ankaŭ » Esperanta?) — Instituto, por ke tiu sinjoro sciu ke ni CIEL defen- » dos niajn negocajn rajtojn! »

Mi registras la esprimon de kamarado Hektor, ke Flandro ne estas homo; li verŝajne pensis ke li eltrovis inteligentan humoraĵon, inda de persono kiu apartenas al reĝa societo; verdire la patronado de la reĝo plibonigis nek la edukon nek la kulturon de la eminenta membro de tiu societo.

« Tiu sinjoro » ne deziras batali por negocaj rajtoj; kamarado Hektor trankvile formetu sian glavon, ĉar alie li riskas fariĝi novan Donkihoton...

G. D. LA HOMO.

Postskribo de la Redakcio. — Tiajn koliziojn inter Esperantistoj ni bedaŭras ĉiam, kvankam ni opinias ke S.ro B. estus povinta defendi la solvendrajton de B. E. I. iom pli... home. Pri la « esperanteco » de Fl. E. I. S.ro B. povas esti trankvila, ĉar la gajnita mono servas por la Esp. movado.

Fragmento

El Parolado de formortinta Jan Van Ryswyck, urbestro de Antverpen, al la geknaboj de la unuagrada lernejoj dum la Nacia Festo, la 21an. de julio 1904 en la Antverpena Komerca Borso. Mia tria strofo temas pri kantado.

Junaj koroj, junaj gorgoj, ili kantas ĉiuj. Kiom tiu kantado ja estas bela! Mi celas la popolkanton, tiel malnova kiel la historio. La popolo ĉiam kantadis pro ĝojo aŭ pro doloro. « Het poverken zingt zoowel van armoe als van weelde », (La ruĝgorĝeto kantas pro malriĉeco same kiel pro riĉego) estas Antverpena proverbo.

Aŭdu kia timema plendo jen supreniras tra la tempoj. Estas la kanto de niaj martiroj, kiuj amis antaŭ ĉio la patrujon kaj la liberecon. Aŭdu la militkanton de la knaboj kaj junuloj. Mi ĝin aŭdis ankoraŭ antaŭ momento: malrapide kaj fiere, kvazaŭ estus preĝo.

La maljunega patrinjo sidas ĉe la ŝpinilo kaj kantetas arieton dum la radeto zumas. Por ŝi la vivo jam iras al sia fino, estas kvazaŭ ĝi estos finŝpinata kune kun la fadeneto. Sed la knabinetoj, kiuj havas ankoraŭ la tutan vivon antaŭ si, kantas pri amo jam multajn milojn da jaroj. Nur la malbonuloj kantas ne.

En ĉiuj cirkonstancoj nia popolo estas kantinta, kiel cetere, ĉiu alia popolo. Ni havas trezoron da malnovaj kantoj, parte elĉerpitaj el sub pulvokovritaj folioj kaj niaj muzikistoj ĉerpas ankoraŭ ĉiam el tiu trezoro.

Kiel povas esti ke popolo, tiel riĉa je perloj kaj juveloj, tiel ofte prenas ŝtonojn el la rivereto. Kaj se nur estus ŝtonoj el la rivereto!

Mi prefere turnas min al vi, karaj knabinoj.

Pensu pri la plej malriĉaj inter la malriĉuloj, kiuj eĉ ne konas kantetojn kaj tamen ankaŭ volas kanti. Sed kiel? La ruĝo de honto venas al vi sur la vizaĝon, aŭskultante tiom da malnoblo.

Nu, ŝajnas ke fino venos al tiu malriĉeco. La Antverpena Sekcio de la Algemeen Nederlandsch Verbond (Generala Nederlanda Asocio) intencas instrui denove al la popolo ĝiajn malnovajn kantojn. Ĝiusemajne oni antaŭkantas ilin, la melodion aŭ arion kaj ankaŭ la vortojn. Tie la trezoro estas ree malfermita kaj la riĉa enhavo estas disdonata al ĉiu. Apud la malnovaj estas la novaj, tiom da kuntrenantaj melodioj, tiom da sencriĉaj vortoj. Mi ne citos nomojn de poetoj aŭ muzikistoj, timante ke mi kelkajn forgesos, sed iru vi mem al la loko, kie oni antaŭkantas la kantojn kaj gaje ekscitata vi aŭskultos la belegan kantadon. Iam viaj infanoj lernos ilin de vi. O! La Kanteto de Patrino! kiom ĝi vekigas dolĉajn rememorojn. Ŝajnas al mi, oni pli ankoraŭ amuz patrinon, se tio estus ebla, patrinon, kiu konas tiajn belegajn kantetojn.

Kaj ĉi kune mia lasta strofo estas finkantita. Gardu en viaj koroj ĉiujn tiujn vortojn, iĝu bonaj homoj, lernu ami la florojn kaj plantojn, lernu protekti la birdojn, anstataŭ turmenti ilin, kaj lernu precipe, lernu tiujn belegajn, flandrajn kantetojn, ĉar pli belaj ne estas.

Tradukis Juul KARNAS.

La Flandra Lingvo en Franca Flandrujo

En 1119 Sankta Norberfo predikis en Valenciennes (1) en sia gepatra lingvo, la dialekto de Clèves, malmulte diferenca de la parolmaniero en Flandrujo. En la 13a jc. la flandra verŝajne estis ankoraŭ parolata en Arras. Restis dokumento pri la flandra, kiun parolis la Cassel-anoj kaj iliaj najbaroj en Hazebrouck en la unua duono de la 14a jc. La lingvo parolata en Artois en la 15a jc. estis ankaŭ la sama kiel en Flandrujo. En la 16a jc. privataj aferoj certe estis traktataj flandralingve en Lille.

En la 16a jc. okazis vera flandra movado en Francujo. Multaj t. n. Retorikaj Societoj estis fonditaj kaj ageme laboris sur literatura kaj teatra kampo. Pro politika agado diversaj estis malfonditaj sub la hispana regado sed ili restariĝis post kiam Louis XIV okupis la francan tronon kaj la flandraj regionoj fariĝis franca provinco en la lasta duono de la 17a jc. Precipe vigla estis la Retorika societo de Dunkerque per la kunlaborado de vera poeto kaj teatrajisto Michiel De Swaen. Multaj francaj flandroj sin distingis poste ĝis en la 18a jc. Post kelkaj jaroj da silento, la Retorikuloj sin grupigis denove sub la revolucia registaro sed poste oni konstatas, ke la flandra ĉesigis esti skribata lingvo kaj nur pluvivas en la buŝo de burĝoj kaj laboristoj precipe en la arondisementoj de Dunkerque kaj Haze-

(1) En tiu ĉi artikolo estas uzataj la francoj loknomoj.

brouck. La lingvo konservis multajn malnovajn formojn el la praa saksa, angla-saksa kaj frisa: estas fakto ke en la 7a kaj 8a jc. la anglaj misiistoj, kiuj alvenis sur la norda marbordo, de Francujo estis komprenataj de la enloĝantoj.

La centriga sistemo de la francaj ŝtato, kiu ankaŭ decidis pri la sorto de baskoj, bretonoj kaj provenĉanoj faris, ke per pluraj ediktoj, komence de Louis XIV, la flandra lingvo iom post iom estis oficiale forpuŝita el juĝpovo, administracio kaj lernejo.

Sed la vivo de lingvo estas rezistema kiel basto: ekzistas eble ankoraŭ ducent miloj da francaj flandroj, sed la apartigo de la ĉefa centro Nederlando kaj la influo de la franca ege premis ilian lingvon. La « Flandra Komitato de Francujo », multege batalis por la konservado de la rajtoj de la flandra lingvo, de la Flandraj moroj kaj tradicioj. Pro la lerta agemo de sia prezidanto Kanoniko Looten, doktoro en filologio de la Sorbonne kaj profesoro de la katolika universitato de Lille, precipe post la milito, la komitata vivo estis tre vigla. La organizo nombris antaŭ kelkaj jaroj 950 membrojn. Unu el ĝiaj ĉefaj taskoj estas la reenkonduko de la lingvo en la lernejon, se ne en la oficialan, almenaŭ en la liberan (katolikan). Diversaj jurnalaj kaj revuaj flandramaj aperaĵoj ankoraŭ en Franca Flandrujo, kie la raskonscio ne pereis malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj ĉiuspecaj.

T.

La Veto

Ili ludis « poker » sur la teraso de la kazino. Ili, t. e. la « posedanto de kurĉevalaro », la « grandkomercisto », la « privatulo » kaj la « grafo ». Neniu el ili sciis, ĉu tio estas vere la ĝustaj « profesioj » de la tri aliaj; sed ili ne faris al si zorgojn pri tio. Tiel ili enskribis sin en la gastlibron, kaj la ludkartoj kaj la ĉevalkuradoj tiom okupis ilin, ke ne restis al ili tempo, por cerbumi pri aliaj aferoj.

La grafo miksis la ludkartojn, kaj kiam li disdonis, la sinjoroj ekparolis pri la junulino, kiu alvenis hodiaŭ, kaj kies blondan belecon ili ĉiuj estis rimarkintaj, kompreneble.

Viroj similas unu al la aliaj, kaj ĉi tiu kvaroj ne estis escepto: ekvidante belan virinon, ĉiuj havas la saman celon, kaj ĉi kredas, ke li havas la plej grandajn ŝancojn. Do baldaŭ ekestis malgranda, amikeca disputeto inter nia kvaroj, kaj la grafo, kiu ĉiam fanfarone reliefigis sian « nerezisteblon » rilate virinojn, diris:

« Nu, bone: mi proponas al vi veton, sinjoroj: al ĉiu el vi mi pagos kvin mil frankojn, se hodiaŭ post unu semajno la bela blondulino ne estos la mia. Sed se, ĝis tiam, vi konvinkigis okulkvide, ke mi venkis, ĉiu el vi pagos *al mi* kvin mil frankojn ».

Kaj la veto estis akceptata.

* * *

Dum la postaj kvin tagoj nenio grava okazis en tiu afero. La sinjoroj interkonatiĝis kun la belulino kaj formis ŝian ĉiaman sekvantaron. Sed preskaŭ ŝajnis, kvazaŭ la grandkomercisto estus la preferato. Al li ŝi donis plej ofte okazon, elspezi monon por ŝi kaj fari al ŝi multvalorajn donacojn.

La sesan tagon, je la matenmanĝo, oni vane atendis la junan sinjorinon kaj la grafon. Anstataŭe ĉe de la pordisto estis letero, per kiu la grafo informis la sinjorojn: li estis eksciinta, ke la sinjorino veturis al la proksima urbo por fari aĉetojn. Li do ankaŭ veturistien, kvazaŭ hazarde renkontos ŝin kaj luos ĉambrojn por la sinjoroj en « Grand Hôtel » por la sekvanta nokto. Ili bonvolu aperi tie vespere kaj tiam ekscios kromajn detalojn.

La sinjoroj pasigis la tagon en komprenebla malkvieteco. Posttagmeze ili veturis al la urbo kaj vespere alvenis en « Grand Hôtel ».

Tie denove atendis ilin letero: la grafo renkontis la sinjorinon kaj akompanis ŝin unue dum ŝiaj aĉetoj. Poste ili kune tagmanĝis. Por la vespero li aĉetis biletojn por teatro, kaj la nokton li pasigos kun ŝi en la ĉambro n-ro. 28.

La ĉambro n-ro. 28 troviĝis apud la ĉambro n-ro 29, kaj la ĉambro n-ro 29 estis unu el la tri menditaj por la sinjoroj. Inter la nroj 28 kaj 29 estis pordo, kiu ja estis ŝlosita, sed kiu, tamen, forte faciligis la observadon, tiel ke la sinjoroj, kompreneble kuniĝis en la ĉambro n-ro 29.

Kaj fakte: ĉirkaŭ noktmezo la grafo venis hejmen kune kun la belulino, kaj ambaŭ kune iris en la ĉambron n-ro 28, kiu—tion estis esplorintaĵ la sinjoroj—estis rezervita por la grafo « kun edzino ».

Tre longtempe la aŭskultantoj aŭdis klare la du konatajn de ili voĉojn. Unue laŭte—poste flustre. Kaj la postan matenon ili vidis—tra fendeto de la preskaŭ nerimarkeble malfermita pordo de la ĉambro n-ro 29—la grafon irantan brak'-sub-brako laŭ la koridoro kun la belulino. Per la necesaj bruaĵoj li estis zorginta pri tio, ke la trio en la apudaj ĉambroj ne fordormis ĝian leviĝon.

* * *

Vespere la grafo alvenis denove en la kazino. La sinjorino ankoraŭ ne estis reveninta, kaj la tri sinjoroj jam atendis.

La grafo ricevis siajn dek kvin mil frankojn. Sed kiam oni postulis, ke li rakontu, li rifuzis: « Mi estas lacega kaj enlitigis nun! », li diris. « Morgaŭ matene vi ekscios, kiel mi ebligis la aferon. Bonan nokton! »

* * *

Dum la posta antaŭtagmezo la tri sinjoroj nur malfacile venkis sian miregon pri tio, kion ili eksciis:

La bela blonda sinjorino tute ne estis reveninta, kaj la grafo malaperis hodiaŭ plej frue per la unua vagonaro. Sed li postlasis leteron, por la tri sinjoroj, kaj tiu letero tekstis jene:

« Vi tri ruzuloj:

» La rimedo, per kiu mi gajnis la monon de mia veto, kostis al mi kvin markojn antaŭ tri jaroj kaj estas — atesto pri geedziĝo, » malpli falsa ol mia grafa titolo. Ĉar la bela blondulino estas — » mia edzino, kaj per la sama veto ni gajnas dek kvin ĝis dudek mil » frankojn ĉiumonate laŭ la sama maniero, nur ĉiam en alia » loko... »

Karl MINOR.

El « *Katalina Esperantisto* ».

For la Batalilojn !

Du usonaj scienculoj: la profesoroj PITRIN kaj SOROKIN faris esploradon pri la militoj en la eŭropaj ŝtatoj dum la lastaj mil jaroj:

Francujo	185	militoj
Anglujo	176	»
Rusujo	151	»
Aŭstrio	131	»
Hispanujo	75	»
Italujo	32	»
Germanujo	24	»
Nederlando	23	»

Oni konkludas laŭ la statistiko « la pacema Francujo » okupas la honorlokon, dum « la militema Germanujo » venas al la vosteto. Laŭ la konkludo de la samaj scienculoj, la milito de 1914-18 estis okfoje pli kruela ol tiuj kiuj okazis dum tiuj ĉi mil jaroj. Tio promesas multe por la sekvonta milito.

Kiam malfermiĝas la okuloj de la homaro?

La rimedoj por kompreni unu la alian devas esti: lernu la internacian helplingvon ESPERANTO kaj FOR LA MILITON! La milito estas nur incitilo de kelkaj, ĉar la popoloj ne deziras ĝin!

Ili demandas nur laboron kaj pacon!

Militviktimoj dum la lastaj jarcentoj.

Eble estas interese scii kiom da viktimoj postulis la militoj dum la lastaj du jarcentoj:

la sepjara milito	551.000
la revolucimilitoj	1.400.000
la militoj de Napoléon	1.700.000
la liberecmilitoj en Usono	624.000
la rusa-japana milito	700.000
la Balkanmilitoj	108.000
la mondmilito	2.300.000

Do dum du jarcentoj la diversaj militoj postulis pli ol sep milionojn da viktimoj kaj kiom da vunditoj, invalidoj, vidvinoj, orfoj kaj mizeruloj? Pro kio? Tiuj ĉi ciferoj diras pli ol ĉiuj eblaj kontraŭmilitaj teorioj. *For la militon! Vivu ni en paco!!!*

J. v. A.

Nekrologo

En Walthamstow (Anglujo), mortis la 14an de decembro 1934 S.ro W. Stormont, avo de nia fervora propagandistino, fraŭlino Doris Fall. Sincerajn kondolencojn.

AARSCHOT. — LA PROGRESO.

Jaudon la 3an de januaro mortis S.ro Frans Van Winkel, patro de nia gvidanto Jef Van Winkel.

La membroj prezentas sincerajn kondolencojn al sia funebranta prezidanto kaj ties familio.

Fantomkastelo kiel hejmo for senlaboruloj kie verkis fama sveda aŭtoro.

La malnova kastelo Hesselby, kiu datiĝas el la tempo de Karlo XII-a, kie laŭdire fantomas « Blanka sinjorino » kaj kie Werner von Heidenstam verkis parton de sia fama libro « La Karolanoj » pri tiu heroo reĝo, nuntempe estas hejmo por nombro da senlaboruloj.

La kastelo kaj ĝia tero apartenas al la komunumo de Stokholmo kaj ne estas utiligitaj post la aĉeto, kiu okazis por provizi grundon por la estonta disvastiĝo de la urbo. La problemo de junaj senlaboruloj, kiuj ricevas monsubtenon kaj pasigas sian tempon senlabore, interesis la aŭtoritatojn, kaj ili decidis utiligi tiun historian konstruaĵon.

Oni provizis ĝin per moderna komforto kaj sendis tien aron da junaj senlaboruloj por ia komuna vivo. Ili mem faras ĉion por si, kuiradon, purigadon kaj aliajn mastrumaferojn, ĉar neniu virino kunestas por fari tion por ili. Krome ili estas instruataj pri manlaboro. Ili ricevas bonajn loĝejon kaj nutraĵon, ili havas lokojn por sporto kaj atletekzercoj, oni igas ilin fari utilan laboron ekz. ĉarpentadon aŭ ĝardenlaboron, kaj oni donas al ili iom da poŝmono. Ilia tagplano ampleksas ankaŭ lecionojn en aritmetiko, lingvoj kaj aliaj objektoj.

En diversaj partoj de Svedujo oni starigis kampejojn por junaj senlaboruloj kaj donas al ili instruadon, dum ili atendas laboron, ĉar la komitatoj por senlaboreco ĉiam provas evitigi ĉe la junuloj alkutimiĝon al maldiligento. La aĝo de la kampantoj estas de 16 ĝis 25 jaroj, kaj oni opinias, ke ili, kiam normalaj laborkondiĉoj revenos, estos pli utilaj membroj de la socio, ol se oni nur donus al ili monsubtenon kaj lasus ilin pasigi la tagojn en maldiligento ĉe stratanguloj kaj en kafejoj.

Stockholm... (Sved-Internacia Gazetservo)

Diversaj Komunikoj

La sanstato de nia Redaktoro provizore malpermesas al li korekti kaj maŝinskribi la alsenditan kopion. Pro tio ne ĉio povas esti enpresigita, kio estas alsendita. Urĝe ni petas al niaj kunlaborantoj kaj korespondantoj sendi la kopion ne pli malfrue ol la 12an de ĉiu monato kaj *prefere maŝinskribite*.

Ekzamenoj. — La grupoj kiuj volas okazigi ekzamenojn, jam povas rezervigi daton (plej bone antaŭ Pasko), sed ne la 24an de marto; kiu unue demandas havos ĉiun okazon! Ĉiuj informoj ĉe F.ino J. Terrijn, Raapstraat, 82, Gent.

Bibliografio

AL TORONTO. — Stellan Engholm. Dua eldono. Ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 96 paĝ. Prezo: broŝ. 8.50 fr.

La esperanta debutromano de la sveda verkisto Stellan Engholm vekis sisteme tre grandan intereson pro la temo pritraktita kiel pro la bela lingvaĵo. La unua eldono baldaŭ elĉerpigis; la oftaj demandoj pri la libro atestas ke ĝi estas tre ŝatata, kaj nun aperis dua eldono, malofte okazaĵo je libro originale verkita en Esperanto.

La aŭtoro ĉerpis la temon de sia romano el la kampara vivo lin ĉirkaŭanta. Serene li rakontas pri la vivo de la laboristoj ĉe la uzino, iliaj interesoj, zorgoj kaj revoj. Amhistorio de du gejunuloj formas la ruĝan fadenon kaj tenas la intereson de la leganto ĝis la fino.

La nova eldono prezentiĝas en bela eksteraĵo kaj presita sur bona papero, kiel ĉiuj libroj eldonitaj de la sveda esperanto-eldonejo.

SVEDA ANTOLOGIO. — Vol. I. 228 paĝ. broŝ. 35 fr., tole bindita 39 fr. Aperis la unua volumo de sveda antologio, kiu prezentas la vaste konatajn aŭtorojn August Strindberg, Gustaf af Geijerstam, Victoria Benedictsson, Anne Charlotte Leffler, Verner von Heidenstam, Oscar Levertin kaj Per Hallström.

La tradukoj de tiu antologio estas faritaj laŭ tre demokrata sistemo. Anstataŭ komisi la tradukadon al nur unu lerta esperantisto-literaturisto, la ĉefredaktoro de la verko, rektoro Sam. Jansson, laborigis lertajn esperantistojn el la tuta lando. Li elektis kaj tradukigis kaj denove elektis inter la tradukoj, ne por ricevi unuformecon sed por ricevi bonlingvajn kaj sencoplenajn tradukojn. Sekve la antologio respegulas ne nur la arton de la verkistoj reprezentataj sed ankaŭ la lingvan nivelon de la sveda esperantistaro nuntempa.

Enkonduke s-ro Hj. Beckman, doktoro pri literaturo, skizas la literaturan epokon, kiun ampleksas la volumo, pritraktante la ĉefajn trajtojn de la verkistoj reprezentitaj kaj karakterizante ilin. La tradukaĵoj el la verkoj de Strindberg, la plej granda verkisto sveda, okupas la plej grandan lokon, sed tiuj de von Heidenstam (Nobelpremiito) estas la plej multnombraj.

La preso, papero kaj bindo estas unuaklasaj. La dua volumo de tiu grava verko baldaŭ sekvos.

« Al Toronto » kaj « Sveda Antologio », estas haveblaj ĉe **Flandra Esperanto-Instituto**.

Ĉe F. E. I. estas havebla la nova eldono de « **Plena Vortaro de Esperanto** », tolbindite, 75 frankojn.

LA VIRO EL FRANCUJO, Aventuro de Geoffrey Gill, detektivo. El nederlanda lingvo tradukis W. Versteeg Graŭtdijk. Kontrolita kaj rekomendita de **Esperantista Literatura Asocio**. Plentole bindita, 31 fr.
RUDYARD KIPLING. — **Het tweede Djungel Boek**:

Wie het eerste Djungel boek las, grijpt met genoegen naar dit vervolg van de wondere lotgevallen van Mowgli, te midden van zijn vrienden: Bagheera de panter, Akela de wolf en Baloo de beer. Even fijn en stemming zijn de ingeschoven verhalen als bijv. Het Mirakel van Purun Baghat, de machtigste der Indiërs, die kluzenaar wordt en met de wilde dieren vriendschap sluit, of « De Lijkwachters », even symbolisch als onze Reynaert de Vos, en « Quiquern » een prachtig hoofdstuk uit het Leven der Eskimo's aan de Noordpool.

Met keurige omslag uitgegeven, zijn deze boeken een echt buitenkansje, waar wij Vlamingen fier mogen op zijn, daar wij nu niet meer noodzaak hebben zijn goedkope fransche uitgaven te koopen om hoogstaande brokken uit de wereldliteratuur te kunnen genieten. Graag verschaft ik alle noodige inlichtingen nopens deze hoogstaande serie der eerste Vlaamsche Boekengilde.

Aalst. L. CALLOENS.

Mi Ŝatas la Solecon

Mi ŝatas la solecon,
Spirito ĝin deziras,
Evitas realecon,
Revado min inspiras.

En land' de l'romantismo
Mi flugas tra ĉielo,
Aŭ falas en abismon,
Aŭ kredas je fabelo.

Kaj ĉarma karulino
Je mia flank' aperas;
Okulojn de feino
Ŝi havas; mi esperas...

Kap' mia ŝi ektenas
Ĉe sia juna sino
Sur buŝon mian premas
Kisegon la knabino.

Mallonga revo estas
Mallonga idilio;
Sed, Dibenate, restas
Dezira sensacio.

Mi ŝatas en soleco
Porigi prozon vivan.
Romana « realeco »
Subpremas efektivan.

Pol VARENS.

Inter Ni

AARSCHOT. — LA PROGRESO.

Por ke la novbakitaj Esperantistoj havigu adresojn por korespondi, la grupo abonis komencè de novjaro al « Heroldo de Esperanto ».

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Nia kristnaskfestoj, kiu okazis la 22an de decembro en la festsalono Van Dyck, eksterordinare sukcesis, precipe dank'al la penado de nia fervora prezidanto. La alloga salono estis plenplena je multaj geamikoj de la grupo, kiuj laŭte aplaudis la diversajn artistojn. Post la unua parto de la programo, kiu estis speciale dediĉita al la infanoj, okazis senpaga lotumado por ili. En la dua parto S.ino Foets aŭdigis kelkajn belajn muzikaĵojn kaj nia anino R. Mertens kantis Ständchen de Schubert kaj « Mijn land is Vlaanderen » el la filmo « De Witte ». S.ro Sauveur ludis kelkajn muzikaĵojn per mandolino kaj S.roj Sprengers kaj Boermans deklamis kelkajn prozaĵojn kaj humorajojn.

Poste okazis la disdonado de kristnaskaj donacoj, alvenintaj por geanoj kaj geamikoj de la grupo. La nombro de donacoj estis vere impona kaj pruvas kiom la geanoj de nia grupo ŝatas unu la alian.

Ankaŭ la lutomado postulis multe da tempo ĉar estis tiom da premioj ke nia festdirektoro Nand Volders estis preskaŭ raŭka elvokinte la multajn gajnintajn numerojn.

La balo kronis la feston, ĉiuj bone amuzis sin ĉar la flandra agrableco regnis kaj la jashando estis perfekta kaj ĉiuj nur kontraŭvole reiris hejmen je la 2a nokte. Kaj nun, post la plezuro, denove al la laboro por nia idealo « ESPERANTO ».

BRUSSEL. — N. E. L. E. — Kaŭze de la preparaj laboroj por nia 6-a kongreso, regas en nia grupo febra, laborema atmosfero.

Nia kurso kontentige funkcias kaj ĉiuj niaj lernantoj jam aniĝas nian grupon.

KORTRIJK. — Merkredo, 6-an de februaro, ĝenerala kunveno en la kutima oĵo.

Sur la tagordo: reelektado de la estraro.

Ĵaŭdo, 14-an de februaro, lasta leciono de la kurso gvidata de S-ano Debrouwere en la urbodomo.

La E. grupo akiris la permeson por disaŭdigi Esperanto-novaĵojn pere de Radio-Kortrijk, ĉiun dimanĉon, je la 9-a matene.

La grupaj informoj estos ankaŭ komunikataj laŭ tiu vojo. La stacio estas aŭdebla ĝis distanco de 50 km.

MECHELEN. — LA ESTONTO.

« En laboro paca ne laciĝos! »... Tiu certe estas la divizo de niaj plej fervoraj membroj.

Estas vere ĝojiga fakto ke malgraŭ indiferenteco de multaj aliaj, malgraŭ la risko ŝajne labori por la pap' el Romo aŭ la reĝo de Prusujo, pliaj el niaj membroj vere entuziasme kunlaboras. Antaŭ nelonge ni trovis en adresaro de 1910 almenaŭ 50 nomojn de Mehlenaj Esperantistoj. Preskaŭ ĉiuj la profesoroj el la loka Kolegio, el la Normala lernejo, K. t. p. Sed vere tiu moŝta aro certe ne konis nian entuziasmon, ĉar ne unu el ili restis atkiva Esperantisto. Nia nuna kerno kvankam ne tiel granda entenas la plej belajn promesojn por la estonto, kaj ek de nun ni jam revas pri Ĝe-kurso dum la sekvonta jaro.

Pliaj membroj jam aliĝis al la Brusela Kongreso. La aliaj sekvul'

RONSE. — LA PACA STELO.

Programo por la monato februaro 1935.

6an de febr. — Nia kutima Kantvespero.

13an de febr. — Daŭrigo de la traduko de la libro « De Filosoof van Haagem ».

20an de febr. — Informoj pri la Esperanto-movado de la prezidanto.

Ĉar nia ĝenerala kunveno nur okazis la 16an de januaro, ni raportos pri ĝi en la marĉa numero.

« La Paca Stelo » denove starigas « ŝparkason » por partopreni multnombro al la Kongreso en Brussel.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA (Vlaamsche Esperantisten - Bond)

Voorzitter: Leo Calloens, Erembodegemstraat, 29, Aalst.
Ondervoorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, Wagenmakerstraat, 45, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Grootte Markt; vergaderingen elke Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « Pannenhuis », Conscienceplein, 3; vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussel: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elke Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Hovestraat, 130.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elke Woensdag avond.
Lede: « La Esperanto Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », lokaal: Bovenzaal der stedelijke Bibliotheek, Wollemarkt; vergadering elke Vrijdag te 20 uur. — Briefwisseling: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54.
Nieuwpoort: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Langestraat, 6.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Wijngaardstraat, 17.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statiedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stacegemstraat.
Hoboken: H. Van Tiggel, Commandant Weynsstraat, 174.
Maria-Hoorebeke: Gerard Broodcoorens, Dorp.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo ».
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

ESPERANTISTOJ!!!

La

KANTARO ESPERANTISTA

Kompilita de Juul Karnas

enhavas 111 kantojn,
estas 112 paĝa,
enhavas ion por ĉies gusto,
enhavas la plej belajn perlojn el la
popolkantoj de ĉiuj nacioj,
estas bele eldonita,
kaj ... kostas nur 6 frankojn!
Mendu ĝin tuj ĉe Flandra Esperanto
Instituto.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacqumainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj
malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

Kien iri je Pentekosto 1935? (8 - 10 Junio)

Al la

6^A Flandra Kongreso de Esperanto en Brussel

300 Bildojn Kaj 1100 Titolvortojn

en densega komposto prezentas al vi la

UNUA VOLUMO DE

ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

sur 272 tekstoj kaj 112 bildopaĝoj, formato 15×23. La dua volumo ampleksos proks. 540 paĝojn.

(Eldono de Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistoj Libro-Amikoj
Budapest).

Ĝi pritraktas per metodoj de scienca laboro la tutan movadon ekde la naskiĝo ĝis la plej lastaj tempoj. Detala historio. Proks. 2000 biografioj. Indiko de libroj, ktp.

Prezo de la du volumoj (la unua sendota tuj post pago): broŝurite 30 fr. svis., bindite: 34 fr. svis. Aldonu 10 % por sendkostoj.

Ekzistas ankaŭ eldono sen ilustraĵoj. Prezo de ambaŭ volumoj, nur broŝurite: 18 fr. svis. plus 10 % por sendkostoj.

Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan.

Havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto. (Poŝtkonto n^o 326.851)

« Presejo de l' Centro », Kipdorpvest, 26, Antwerpen.